

# Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 45, marto 2020

## Studogrupo kaj Universitato Princeton prokrastis sian simpozion

Fronte al amasaj fermoj kaj vojaĝlimigoj, la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj decidis prokrasti sian simpozion 2020 ĝis la posta jaro. Sub la titolo "Lingvo kaj Migrado", la simpozio estas komuna aranĝo de la Studogrupo kaj de la Instituto pri Internaciaj kaj Regionaj Studoj (PIIRS) ĉe la Universitato Princeton. La organizantoj de la simpozio planas ekzameni gamon de temoj, precipe rilate al lingvo kaj rifuĝintoj, kaj rakontoj pri migrado. La ĉi-majaj sesioj dividiĝus inter la Eklezia Centro por UN Ĉe 777 UN Plaza kaj la kampuso de la Universitato Princeton. Inter la ĉefparolantoj estis la verkisto de romanoj Viet Thanh Nguyen kaj esploristo ĉe Universitato Harvard, Sarah Dryden-Peterson. Oni antaŭvidis referaĵojn el deko da landoj.

La nun esperataj datoj de la simpozio estas 29 aprilo – 1 majo, 2021.

## Universala Esperanto-Asocio markis la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2020, per alvoko al instruado en lingvoj kiujn la lernantoj komprenas

Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, Universala Esperanto-Asocio sendis la jenan mesaĝon al Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO:



Internacia  
**TAGO** de la  
**GEPATRA  
LINGVO**

21-a de  
februaro  
2020

En oficialaj  
rilatoj kun  
UN kaj UNESCO

"Ni devas defendi ...  
la indiĝenajn lingvojn,  
pri kiuj ni scias, ke ili  
malaperas laŭ la ritmo  
de po unu ĉiujn du  
semajnojn - kio estas  
neriparebla perdo por  
la homa heredaĵo."  
Direktoro Ĝenerala, UNESCO

**Infanoj rajtas lerni per sia hejma lingvo.**

**Unesko** kaj la movado por la internacia lingvo, **Esperanto**,  
respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturen diversecon  
en la mondo.



Legu pli: [www.linguistic-rights.org/21-02-2020](http://www.linguistic-rights.org/21-02-2020)  
Pri lingvoj: [www.lingvo.info](http://www.lingvo.info) Pri interreta komunikado: [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) | [www.uea.org](http://www.uea.org)

Unuiĝintaj Nacioj kaj ties membraj ŝtatoj alvokis al atingo de bonkvalita edukado por ĉiuj kiel la kvara el deksep Celoj por Daŭripova Evoluigo atingendaj ĝis la jaro 2030. Inter la antaŭvidataj rezultoj kaj la iloj por realigi tiun kvaran Celon por Daŭripova Evoluigo estas:

- Universala elementa kaj meza edukado
- Universala antaŭelementa edukado
- Universala kapablo legi kaj skribi inter la junularo
- Genra egaleco
- Efikaj lernaj medioj
- Kvalifikitaj instruistoj

Tiu Celo supozigas, ke, se studentoj frekventas lernejojn sub zorgo de kvalifikitaj instruistoj, ili lernos.

### **Sed tie kuŝas silenta antaŭsupozo – nome ke la studentoj instruigu en lingvo kiun ili komprenas.**

En multaj landoj kaj cirkonstancoj ili ne estas instruataj en la propraj lingvoj kaj oni malmulton faras por helpi ilin transiri al la lingvo de instruado. Tio ofte malavantaĝas ilin tutvive, nuligante la pozitivan de lerneja ĉeesto, de kompetenta instruado, kaj de investo en lerneja infrastrukturo. Sen instruado de lernantoj en lingvo kiun ili komprenas, ni forĵetas monon kaj, kun ĝi, promesplenajn vivojn.

Pro tio, UNESKO proklamis la 21-an de februaro Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, festata ĉiujare. Ĝi ĉefe celas emfazi la edukajn avantaĝojn de uzado de la gepatra lingvo en lernejoj, precipe elementaj lernejoj. Infanoj lernas legi kaj skribi pli rapide en lingvo kiun ili plene scipovas – aŭ, pli precize, ili spertas malavantaĝon se ili devas komenci sian lernadon en lingvo kiun ili ne scipovas, parte aŭ komplete.

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo memorigas nin ankaŭ, ke en multaj mondopartoj al tutaj lingvoj mankas oficiala statuso, oni diskriminacias kontraŭ iliaj parolantoj, kaj oni malatentas iliajn kulturajn valorojn.

Universala Esperanto-Asocio, kiel unu el malmultaj neregistaraj organizoj kiuj sin koncernas pri lingvaj demandoj, forte subtenas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo kaj ĝia mesaĝo de lingva justeco por ĉiuj. Kiel diris Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, en 2018: “Nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.”

Mallonge dirite, UEA kredas je edukado por ĉiuj en lingvoj kiujn ili komprenas, je lingva justeco ĉiuaspekta, kaj je monda paco per edukado kaj kompreniĝo. Nia Asocio laboras por tiuj celoj en ĉiu angulo de la mondo, ligita de la Internacia Lingvo Esperanto. Ni alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO, kaj ĉiuj laborantoj por daŭripova mondo, ke ni kune atingi la kvaran Celon por Daŭripova Evoluigo kaj la scion, egalecon, justecon kaj perspektivon kiuj akompanus tiun atingon.

### **UEA salutas la virinojn de la mondo, precipe la anojn de la tutmonda Esperanto-komunumo, okaze de internacia Virina Tago, 8 marto 2020**

Parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto, same virinoj kiel viroj, troviĝas en ĉiu angulo de la mondo. En sia rolo kiel internacia lingvo laboranta por rekta kaj nefiltrita dialogo inter la civitanoj de la mondo, Esperanto unike situas por ĉie helpi virinojn interkomunikiĝi trans la bariloj de distanco kaj lingvo, interŝanĝi vidpunktojn kaj ideojn, kaj organizi sin ĉiuloke por agado subtene al virinoj.

Ni rekonas, ke multo farendas: egala kompenso por egala laboro, aliro al edukado, adekvataj sanservoj, jura egaleco, egala klerigo por knabinoj kaj knaboj – la listo longas. El inter tiuj infanoj kiuj havas aliron al edukado, tro multaj knabinoj frue forlasas la lernejon, antaŭ ol ili povas evoluigi la proprajn lertojn aŭ pretigi sin por karieroj. Kvankam Unuiĝintaj Nacioj atingas progreson, precipe per Tagordo 2030 kaj ties Celoj por Daŭripova Evoluigo, kreskantaj problemoj pro klimatsanĝiĝo, dislokiĝo, militagado kaj epidemioj subfosas tiun progreson – kaj estas eviteblaj. Bezonataj estas pli da dialogado, pli da preteco kompromisi, pli da interkompreniĝo, inter homoj kaj registaroj ĉie. Ni parolu la lingvon de la paco.

“Veraj ŝanĝoj,” laŭ Unuiĝintaj Nacioj, “estas dolorige malrapidaj por la plimulto de virinoj kaj knabinoj de la mondo. Hodiaŭ eĉ ne unu lando povas pretendi, ke ĝi atingis genran egalecon.” Ĉehejma kaj publika perforto kontraŭ virinoj daŭras, same kiel rezisto al feminismaj sukcesoj. “Venis la tempo,” diris Ĝenerala Sekretario António Guterres lastatempe “kiam ni ĉesu klopodi ŝanĝi virinojn, kaj komencu ŝanĝi la sistemojn kiuj malhelpas ilin atingi sian potencialon.”

UEA rekonas kaj honoras la gvidan rolon de virinoj en movadoj por lingva kaj kultura revivigo, kaj por ŝirmi la endoman sferon kontraŭ subpremo kaj diskriminacio. Tiaj iniciatoj formas esencan parton de la strebado starigi mondon kie multaj kulturoj kaj lingvoj povu harmonie konekzisti, kaj kie vera genra egaleco realiĝu.

Sekve, ni esprimas nian solidarecon kun movadoj por forigi diskriminacion kontraŭ virinoj kaj knabinoj kaj krei daŭripovan estontecon kiam ĉiuj homoj traktiĝas kun egalaj atento kaj respekto, sendepende de lingvo, kulturo, genro, kaj aliaj formoj de diverseco.

### **La pandemio ŝanĝis la fokuson sed ne bremsis la Esperanto-movadon**

Centoj da Esperanto-aranĝoj, antaŭviditaj en la venontaj du-tri monatoj de Israelo ĝis Ĉinio kaj de Brazilo ĝis Aŭstralio, nuliĝis aŭ prokrastiĝis – sed la Esperanto-movado, kun sia firme starigita reta ĉeesto, simple ŝanĝis rapidumojn. Diskutaj grupoj kaj similaj kontaktejoj estas pli aktivaj ol iam ajn, ĉeestaj aranĝoj virtualiĝis, kaj lokoj por lerni Esperanton, kiel ekzemple Duolingo kaj lernu.net, allogis multan atenton. Ŝlosite en siaj hejmoj, esperantistoj etendas virtualan manon al kolegoj kaj amikoj alilandaj kun rimarkinda solidareco. La estraro de universala Esperanto-Asocio, sub gvido de sia prezidanto Duncan Charters (Usono), forte laboras por adapti la Asocion al ŝanĝigantaj cirkonstancoj.

Pliaj novaĵoj:

- UEA aktive partoprenis estrarkunsidon de la Konferenco de Neregistaraj Organizo (CoNGO), kiu okazis en Novjorko komence de marto. La kunsido dediĉis specialan atenton al la Deklaracio de CoNGO okaze de la 75-a Jubileo de Unuiĝintaj Nacioj, kaj al plimultigo de la membraro tra la tuta mondo. La deklaracio haveblas ankaŭ en Esperanto: [www.ngocongo.org](http://www.ngocongo.org) .

- Francis Hult, nova membro de la teamo kiu reprezentas Universalan Esperanto-Asocion ĉe Unuiĝintaj Nacioj, reprezentis al Asocion en speciala kunsido pri la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo la 21-an de februaro.
- Gadirou Diallo, postdiploma studento en la programo pri internaciaj aferoj ĉe Kolegio Baruch de la Urba Universitato de Novjorko, aliĝis al la teamo kiel staĝanto en la oficejoj de UEA kaj CoNGO. Gadirou naskiĝis en Gvineo.
- Humphrey Tonkin reprezentis UEA kaj CoNGO en la Altnivela Interaga Dialogo okaze de la Interenacia Tago de Edukado la 24-an de januaro. Li ankaŭ faris paroladon ĉe la Informsesio por la Civila Socio kaj Dialogo pri UN75, kiun kunvokis CoNGO ĉe 777 UN Plaza la 5-an de marto. Inter la aliaj parolantoj estis Gillian Sorensen, iama Subskretario Ĝenerala de UN por Eksteraj Rilatoj kaj la ambasadoroj de Kataro kaj Svedio.
- La Konferenco de NROj (CoNGO) laboras en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno, precipe pere de reto de komitatoj pri temoj aparte interesaj al UN. Inter lastatempaj proponoj sub konsidero de CoNGO estas starigo en Novjorko de Komitato pri Lingvo kaj Lingvaĵo.

*Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio,*

*777 United Nations Plaza, New York, NY 10017*

*[1] 212-687-7041*

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041